

Bulgara ESPERANTISTO



* * *	Internacia Infanasembleo „Standardo de la Paco“	1
Ŝinka Filaretova.	Amikeco	3
Ljuba Bojaĝieva.	Epoko	3
Nevena Nedenĉeva.	Ĉu fremda?	3
Ilija Ivanov.	Korespondado — ekzemplo de patriotismo kaj internaciismo	6
Nadia Andrianova.	Ses semajnojn inter amikoj kaj fratoj	7
* * *	Verda Tabulo	9
* * *	Juna esperantisto.	9
Coĉo Kolarov.	Kvarfoje laborbrigadano en Bulgario	9
Lvgeni Georgiev.	TEJO kaj ties ekstera jrilatoj	10
* * *	El „Oficiala komuniko 2“ pri la 64a UK	11
Semjon Podkaminer.	La sovetaj esperantistoj	12
Tatjana Koptjagina.	„Liro — 78“	13
* * *	I Centra internacia E-laborbrigado en Hungario	14
Ĥristo Nikolĉev.	Filaserdika — 79	14
Dimitro Haĝiev.	Ĉu neŭtraleco kaj pasiveco rilate pacproblemojn decas al la esperantistoj?	15
Veselin Andreev.	Bistre	16
* * *	Tra la gazetaro	16
* * *	Pensoj de eminentaj bulgaroj	III

Redakta komitato :

Kunĉo VALEV (ĉefredaktoro).
Nevena ALEKSIEVA. Marin BĂCEV. Ljuba BOJAĜIEVA.
Ĥristo GOROV, Dimitro DEN-
ĈEV, Dimitro HAĜIEV, Krâstu
KARUCIN. Haim LEVI.

*Abonkotizo nur jara : por B l-
gario — 2 levoj, por socialismaj
landoj — 3,80 levoj, por la ete-
raj landoj — 4,16 levoj. Apar-
ta numero 0,17 levoj.*

*Korespondanoncoj: 10 stotin-
koj por nu vorto. Adresoj l
eksterlando estas publikigataj
senpage.*

Sur la kovrilpaĝo :

Feliĉe vivas kaj edukiĝas la bulgaraj infanoj.
S r la fotoj; El la vivo en infanĝardenoj.

Ĉi-jare la Vintraj Semajnaj E-Kursoj okazis en la pitoreska loko Nareĉenski Bani (Rodopi-montaro), de la 3 ĝis la 9 de januaro. Partoprenis ĉ. 90 personoj el la tuta lando. Funkciis 4 klasoj: 2 en la I grado kun gvidantoj Jordan Angelov kaj Julia Blagoeva, 1 en la II grado kun gvidanto Violin Oljanov kaj 1 en la III grado kun gvidanto Kunĉo Vălev.
Sur la foto: parto de la kursanoj kun la gvidantoj *Foto:* Stefan Kânĉev



**INTERNACIA INFANASEMBLEO „STANDARDO DE LA PACO“****Sofio, 15—25 de aŭgusto 1979**

Altaj protektantoj: *TODOR JIVKOV* — prezidanto de la Ŝtata Soveto
de Popola Respubliko Bulgario

AMADOU MAHTAR M'BOW — ĝenerala direktoro de UNESKO

**SALUTO KAJ INVITO DE LA BULGARAJ INFANOJ
AL LA INFANOJ DE LA TUTA MONDO**

Saluton al vi, karaj geamikoj el ĉiuj kontinentoj, el ĉiuj landoj, el ĉiuj popoloj, al vi, kiuj amas la arton, al vi, kiuj strebas al la beleco.

Ni adresas nin al vi kiel al gefratoj, ĉar ĉiuj ni estas idoj de la Homo. Nia lando estas Bulgario. Sur la karto serĉu ĝin en la Balkana Duoninsulo, en la suda parto de Eŭropo. Iam oni nomis la Balkanojn „pulvejo de la Malnova Kontinento“. Ni volas iom revii, kune kun vi, ke ne nur la Balkanoj, sed ankaŭ la tuta juna mondo transformiĝu en ĝardenon de amikeco kaj eterna paco.

La plenaĝuloj el la granda familio de la popoloj — UNO, donacis al ni unu tutan jaron. Kion ni faros dum ĝi?

Ni, la infanoj de Bulgario, kune kun niaj amataj instruistoj, verkistoj, pentristoj, komponistoj, decidis proponi nian patrolandon kiel vian kaj nian komunan domon en la somero de 1979. Ni invitas vin al Internacia Infanasembleo, kiun ni nomis „Standardo de la Paco“. Malgranda estas nia lando, sed ĝia koro povas enteni la muzikon de ĉiuj infanoj, la vortojn de ĉiuj infanoj, ĉiujn viajn kantojn, ĉiujn pentraĵojn, dancojn kaj versaĵojn.

Ni ne konkuros inter ni. Ni invitas vin al renkontiĝo de la estontaj pentristoj, renkontiĝo de la estontaj muzikistoj kaj renkontiĝo de la estontaj verkistoj — la estontaj kreantoj de novaj belegaj universoj.

Tio estos renkontiĝo kun nia estonteco, tio estos renkontiĝo de niaj revoj, de niaj esperoj, de niaj streboj al feliĉo, beleco kaj harmonio!

... Malnova legendo rakontas, ke el malproksimo al la homoj venis sendito por doni al ili egalecon, fratecon kaj ĝojon. En siaj ĝardenoj la homoj estis kulturantaj nur malamon, mallumon kaj malamikecon. Delonge ili forgesis la kantojn. La sendito forpelis la mallumon, la malamo komencis estingiĝi. La glavoj restis pendantaj sur la muroj. Sed ĉiuj homoj estis silentaj, ĉar ili delonge forgesis la kantojn. Tiam la sendito kunvokis la infanojn, kondukis ilin



al arbaro kaj diris: „Infanoj, la floroj estas viaj, viaj estas la torentoj, via estas la arbaro! Mi ripozos, kaj vi serĉu dume, ĉu vi ne renkontos la ĝojon en tiu ĉi arbaro.“ La infanoj komencis time promenadi tra la arbaro. Kiam ankaŭ la plej malgranda infano haltis sur la herbejo kaj ekrigardis radion de la suno, la flava alaŭdo komencis sian alvokon. Post ĝi la infaneto ĝoje ekkriis: „Nia estas la suno! . . .“ Kaj la homoj ekkantis.

Kial ni rakontas al vi ĉi tiun legendon? Ĉar ni deziras, ke nia letero kiel la bona sendito atingu vin. Donu vian manon, amikoj el la tuta mondo! Nia estas la suno! Ĉiuj homoj ekmarŝu post ni, ni estas la komenco. Ni volas porti en ni neestingeblan strebon al la beleco, fariĝi ĉiam pli perfektaj, disvolvi nian talenton multflanke kaj hele, konstrui nian mondon laŭ la leĝoj de la beleco.

Ni scias, ke la infanoj vivas diversmaniere en la mondo. Iuj silabas la unuajn vortojn en vastaj kaj helaj lernejoj, aliaj ne povas proksimiĝi al la lumo de la scio. Super iuj la ĉielo estas hela kaj libera, super aliaj — kovrita de perforto kaj teruro.

Sed kie ajn estas la infanoj, ili havas unu veran amikon, bonan kiel la homa koro — tio estas la paco. Pere de ĝi la bulgaraj infanoj sendas al vi siajn salutojn kaj inviton. Kun ĝia standardo ni atendas vin por kune fari tion, kion povas nur la infanoj. Ĉar al ni apartenas la kosmaj foroj, al ni apartenas la estonto!

Ni ne volas semi ventojn kaj rikolti ŝtormojn. Ni volas semi kantojn por rikolti morgaŭ himnojn!

Saluton, karaj geamikoj!

La infanoj de Bulgario sendas al vi siajn ridetojn kaj atendas vin ĉe la sojlo kun pano kaj salo* kiel senditojn de la beleco kaj paco!

* Laŭ malnova kutimo de la bulgara popolo oni renkontas bonan amikon kun pano kaj salo.

EL „LETERO-ADRESO DE LA BULGARAJ AGANTOJ EN LA SFERO DE SCIENCO, EDUKADO KAJ ARTO AL SIAJ KOLEGOJ EN LA TUTA MONDO“

Karaj amikoj,

Ni, grupo de bulgaraj sciencistoj, pedagogoj kaj kreantoj de arto, kiuj laboras por la estetika edukado de la popolo, per la rimedoj de amasinformado kaj ĉe personaj renkontiĝoj en lernejoj kaj infanaj ripozdomoj, konigis al niaj lernantoj, al niaj malgrandaj legantoj, aŭskultantoj kaj spektantoj la decidon de UNO proklami 1979 jaron kiel Jaron de la Infano. La bulgaraj infanoj manifestis viglan intereson al tiu ĉi nobla iniciato kaj proponis renkontiĝon kun siaj kamaradetoj el la tuta mondo. Tiel naskiĝis la ideo pri Internacia Infanasembleo „Standardo de la Paco“.

Ni adresas nin al vi, kolegoj kaj amikoj, subteni tiun ĉi iniciaton kaj per viaj kompetentaj konsiloj kaj agoj helpi la infanojn en viaj landoj por ĉiufanka manifestiĝo dum la variaj aranĝoj enkadre de la Asembleo.

. . . La Internacia Infanasembleo estas dediĉita al la ideo pri proksimiĝo de la popoloj pere de proksimiĝo de ties infanoj amantaj la arton. Ni kredas, ke tiu renkontiĝo — kun via partopreno kaj partopreno de la naciaj UNESKO-komisionoj — esprimos la strebon de ĉiuj popoloj vivi en paco kaj amikeco.



AMIKECO

*Al mia amikino Eva Vojniĉ
el Subotica*

Eva, mia amikin',
forte mi amegas vin!

Ĉar vi havas koron varman
kaj animon tiel ĉarman, —
freŝa kiel matenhelo,
kiel pura bluĉielo.

Viaj vortoj Esperantaj
sonas kiel dolĉa kanto.

Pri vi ĉiam en la koro
floras kara rememoro.

Nia amikec' por mi
estas kiel poezi',

milda kiel ora lùm'
kaj post frosto — varma sun'.

La okuloj bluĉielaj
estas kiel floroj belaj.

Amikino mia vera,
via rido kaj sincero

al mi donas multan ĝojon
kaj lùmigas mian vojon.

Eva, mia amikin',
kore mi salutas vin!

Nun mi kisas vin kun amo
kaj atendas mi kun flamo

la leteron vian belan,
kara amikino Eva!

Ljuba Bojaĝieva

EPOKO

En nia horora atoma jarcento
neniam ni klinu la kapon fieran',
sed paŝu ni firme kaj spite al tentoj.
Kaj alfrontante militon kruelan,
ni vivu fratame,
ni kreu ĉiame

kaj sukojn ĉerpante el tero patria,
elpremu ni akvon el firma granito
kaj fajron brulantan el koro glacia!

En nia horora atoma jarcento
ni tamen atentu, neniam forpelu
el koroj sinceraj la fratan amsenton,
de l'homa animo la voĉon fidelan. . .

Ni vivu fratame,
ni kreu ĉiame. . .

Ĉe la malamiko ni veku komprenon,
ke se li etendus la manon amike,
renkontos responde li varman manpremon.

POEZIO kaj BELLETR

Nevena Nedelĉeva

ĈU FREMDA?

Mi estis impeta, petolema, ludema
infano. Panjo ne estis tre karesema
al mi, paĉjo estis ĉiam serioza, sed
mi ne atentis tion. Mi vivis en mia
mondo de ludoj kaj senzorga infaneco
kune kun mia fratineto Anjo.
Mi amis ŝin multe, tial tute ne
impresis min la fakto, ke panjo kaj
paĉjo preferas ŝin. Ŝi estis tiel bela,
saĝa kaj bona infano! Mi vere opiniis,
ke ne povas ekzisti sur la tero
homo, kiu ne amus ŝin. Ŝi donis al
mi tion, kion mi ne ricevis de miaj
gepatroj — amon, tenerecon, atenton.
Ricevante ion, Anjo ĉiam demandis:

— Kaj por Lili?

Sia amo al mi iufoje atingis ĝis
eksceso, kio incitis paĉjon. Tiam mi
ne komprenis kial, sed li rigardis min
serioze kaj iris al sia ĉambro. Anjo
sin ĵetis impete sur mian kolon kaj kisis
min.

Foje, mi rememoras, estis varma,
somera tago, kiam panjo sendis min
aĉeti panon. Tiam ni loĝis en malgranda
provinca urbeto. Anjo, kiel ĉiam,
venis kun mi. En la proksima vendejo
mankis pano kaj ni, ludante kaj kurante
sur la strato, iris al malproksima
panbakejo. Tie oni diris al ni, ke la
pano estas ankoraŭ ne finbakita, kaj ni
restis atendi ĝin.

Subite ekpluvis. Mi kaj Anjo eliris
sur la straton kaj komencis salti sub
la pluvo.

— Venu, eniru ĉi tien! — vokis
nin iom dika virino el la panbakejo.

Anjo ekrigardis min ridetante, ankoraŭ
mi ekridis, kaj ni ankoraŭ pli forte
eksaltis. La pluvo pliigis nian gajecon.

— Eniru do! — mi sentis, ke iu
kaptis min je la ŝultroj. Estis juna,
bela virino. — Vi malvarmumos! —
ŝi aldonis kaj sen lasi min kaptis

ankaŭ Anjon kaj kondukis nin ambaŭ en la bakejon.

— Al kiu apartenas tiuj infanoj? — mi aŭdis, ke ŝi demandas la virinojn, atendantajn panon.

— Al d-ro Spiridonov, — respondis iu virino, staranta apude. Ili ekparolis inter si. Mi kaj Anjo, ankoraŭ en gaja humoro, kombis niajn malsekajn hararojn per la malgrandaj kombiletoj, kiujn panjo antaŭ nelonge donacis al ni. Ĝuste en tiu momento mi vidis katidon, kiu pasis inter la piedoj de la virinoj kaj kaŝis sin sub la tablon, sur kiun la bakisto metas la panon. Mi kliniĝis por vidi, kie kaŝis sin la katideto. En la sama momento mi aŭdis, ke unu el la konversaciantaj virinoj diris:

— Mi ne sciis, ke d-ro Spiridonov havas tiel grandan filinon.

— Nur la malgranda estas lia, — respondis la alia virino. — La granda estas infano de la edzino el ŝia unua geedziĝo.

— Lili, Lili, kaptu ĝin! — kriis al mi Anjo kun brilantaj okuloj.

Sed mi ne kaptis la katidon. La tuta mondo turniĝis antaŭ mi. Mi ne scias, kiel mi ekrigardis la virinojn, ĉar ili turniĝis al alia flanko, kaj mi aŭdis la unuan diranta:

— Ĉu la knabineto ĝis nun tion ne sciis?

— Kiel ŝi povas ne scii. Tion ja ĉiuj scias. Nur vi ne, ĉar vi antaŭ nelonge ekloĝis ĉi tie.

Tiam mi estis dekjara. Ekde tiu tago mi ĉesis ludi, ĉesis esti petolema, ĉesis esti infano. Neniam plu paĉjo povis riproĉi min pro malobeemo. Mi plenumadis ĉion, kion li volis. Ne plu atendente kun kortremo lian maloftan kareson, mi ne miris, ke li ne nomas min per dorlotaj nomoj kiel Anjon.

Foje mi aŭdis paĉjon diri al panjo:

— Lili multe ŝanĝiĝis. Ŝi ne plu manifestas kapricojn.

— Ŝi kreskis granda, — respondis panjo.

Vespere, kuŝante en la lito, mi

ofte ploris en mia ĉambro. Mi multe amis paĉjon. Li estis serioza, silenta, kaj mi supozis, ke li komprenas mian amon al li.

Mi komencis intence cedi al la deziroj de Anjo. Ŝi estis la infano de tiu domo, kaj mi estis la fremda, do mi havis neniun rajton pri io ajn. Dum tiu tempo mi pensis, ke ne nur paĉjo ne estas mia patro, sed ankaŭ ke panjo ne estas mia patrino, ĉar ŝi neniam protektis min, neniam defendis miajn rajtojn.

Jam poste mi eksciis, ke paĉjo tre incitiĝadis, kiam panjo montris tenecon kaj amon al mi. Ŝi devis deteni ĉiun tenecon al mi, ĝis ŝi kutimiĝis tute ne karesi min.

La tago, kiam Anjo komencis viziti lernejon, estis vera festo. Tiu tempe ni jam estis translokiĝintaj en Sofion. Tiu tago estis ankaŭ naskiĝtago de Anjo, tial ni havis gastojn. Panjo preparis sukeraĵojn, kaj paĉjo estis en nova kostumo.

Mi ne memoras, ke mi iam ajn enviis al Anjo. Ŝi ege amis min, ankaŭ mi amis ŝin, kaj mi ne povis permesi similan senton direktita al ŝi. Sed mi perdis la kapablon ĝoji.

Dum la tuta tago mi legis, preparis la lernolibrojn kaj kajerojn por la nova lernoĵaro. Anjo alportis, mi ne memoras, kiom da sukeraĵoj kaj perforte metis ilin en mian buŝon. Apenaŭ la vesperon mi iris en la ĉambron, kie ĉiuj estis kunvenintaj. Tiam por unua fojo mi vidis, kiel paĉjo direktas daŭran rigardon al mi. En tiu momento li proksimiĝis kaj karesis mian hararon.

Tiu kareso, kiel ĉiam, alportis grandan agrablecon al mi, sed mi ne turniĝis ridetante al paĉjo, kiel antaŭe, kiam mi ankoraŭ ne sciis. . .

— Kion vi faris hodiaŭ? — demandis min paĉjo dum la vespermanĝo.

— Ho, ŝi havas multe da lecionoj, — respondis Anjo anstataŭ mi, kaj mi estis tre danka al ŝi.

Mi plue vespermanĝis silente kaj paĉjo nur ĝemspiris profunde.



Poste, kiam mi jam estis kuŝanta en la lito, la pordo de la ĉambro malfermiĝis kaj iu eniris. Ĉar mi estis ploranta, mi ŝajniĝis min dormi. Por granda mia surprizo estis paĉjo. Li alpaŝis senbrue, karesis mian hararon kaj kisis la frunton. Poste eliris.

La larmoj ankoraŭ pli forte ekfluis sur miaj vangoj.

La ĝojo de Anjo estis tre granda, kiam naskiĝis nia frateto Geĉjo. Mi akceptis lin sen ĝojo, sen entuziasmo. Post kelka tempo, ĉar li estis tre bela bebo, mi ekamis lin, sed neniam tiel, kiel mi amis Anjon.

Anjo estis la sola estaĵo, kun kiu mi interparolis. Ĉiam ŝi diris al panjo kaj al paĉjo, kion mi bezonas en la lernejo.

Foje ni havis gaston — amikon de paĉjo, samklasano el la gimnazio. Verŝajne li, loĝante en la provinco, sciis nenion pri mi, tial li diris:

— Asen, via granda filino tute similas al vi, kaj laŭ aspekto, kaj laŭ karaktero. Ankaŭ vi estis tiel silentema kaj lernema.

— Ĉiuj gejunuloj en tiu aĝo similas unu al alia, — respondis paĉjo.

— Ne ĉiuj, — kontraŭdiris la gastto, — mi havas filinon, iom pli junan ol la via, sed ŝi estas tre babilema. Ŝi estas saĝa, sed petolema kiel tiu ĉi, — li premis la koleton de Anjo, kiu rigardis lin kun rideto. Poste ŝi ekpepis ion kaj tiumaniere savis paĉjon el la maloportuna situacio, en kiu li troviĝis. Entute Anjo estis saĝa knabino. Ĉu ankaŭ ŝi eksciis, ke paĉjo ne estas mia patro?

Mi finis la naŭan klason kun plej alta distingo. Ankaŭ Anjo finis sian klason kun distingo. La saman vesperon paĉjo revenis en tre bona humoro. Li tenis en mano virinan brakhorloĝon kaj ridetante diris:

— La horloĝo estas por unu distingulino.

La okuloj de Anjo haltis sur la horloĝo. Mi estis certa, ke panjo supozas, kiel mi, ke la horloĝo estas por Anjo.

Paĉjo komprenis nian penson kaj diris:

— Ne, la horloĝo estas por vi, Lili.

Por momento en la okuloj de Anjo aperis ombro, kiu tuj ŝanĝiĝis en lumon.

Mirifuzis preni la horloĝon, samkiel, mi rezignis pri multaj aliaj objektoj-favore al Anjo. Paĉjo estis tre ĉagrenita, sed mi restis senceda. Li metis la horloĝon en sian poŝon. La vespermanĝo pasis en malbonigita humoro. Eĉ Anjo komprenis, ke estas pli bone silenti.

Kiam mi eniris mian ĉambron, mi trovis paĉjon sidanta ĉe la tablo, apogante la kapon per mano. Vidinte min, li ekstaris kaj proksimiĝis al mi.

— Kion vi scias? — li demandis min.

— Ĉion, — mi respondis.

— Ne, ne ĉion, se vi povis agi tiel.

— Mi opinias, ke mi agis tiel, kiel vi volas.

— Mi?

— Jes.

— Ne, mi volis, ke vi akceptu la horloĝon.

— Ĝi ne estas necesa al mi.

— Lili, multfoje mi volis paroli kun vi, sed ĉiam mi pensis: ĉu mi estos komprenita? Vi estis malgranda. Mi atendis, ke vi kresku granda. Ĉu vi estas certa, ke vi bone komprenos min, se mi parolos al vi ĉi-vespere?

— Jes.

— Bone. Mi ĝojas, ke vi estiĝis prudenta kaj komprenos, ke ni, la homoj, fariĝas kelkiam viktimo de niaj sugestitaj pensoj kaj antaŭjuĝoj. Unu el tiuj antaŭjuĝoj estas tiu, ke mi ne estas via patro.

Mi ektremis. Mi ne atendis, ke li tiel rekte ekparolos al mi. Li daŭrigis:

— Tiu ĉi antaŭjuĝo naskis en mi ĵaluzon kaj mi incitiĝis pro la amo kaj atento, kiujn via patrino manifestis al vi. Poste, kiam Anjo naskiĝis, mi komprenis, ke mi eraras. Ŝi faris por Anjo aferojn, kiujn

neniam ŝi farus por mi. La infano havas sian specifan lokon en la patrino koro... Mi ne scias, ĉu vi kredos al mi, ke mi multfoje demandis min, kiun mi pli amas — vin aŭ Anjon. Kaj mi ne povis respondi. Mi naskis Anjon per mia korpo kaj vin per mia animo. Tial mi neniam miras, kiam iu substrekas vian similecon al mi. Kiam poste vi komencis rezigni pri multaj aĵoj favore al Anjo, kiam vi neniam plu ridetis kaj evitis nomi min „paĉjo“, kiam vi perdis la liberecon de senzorga birdo — mi suferis. Sed tiu sufero proksimigis min al vi. Kaj ĉiun tagon, ĉiun horon, ĉiun momenton tiu

sufero ĵetis fadenojn, kiuj ligis min kun vi. Oni diras, ke la patrino kun sufero naskas infanon, tial ŝi tiel multe amas ĝin. Ankaŭ mi naskis vin kun sufero, pro tio mi tiom multe amas vin. Nun vi estas mia filino.

Mi levis la okulojn, kiel delonge, delonge mi ne faris tiel, kaj ekrigardis al li. En la okuloj de paĉjo, elradiantaj lumon, mi vidis rigardi min la okuloj de mia patro.

— Paĉjo! — mi ekkriis, etendante manojn al li.

— Infano mia! — li brakumis min.

Iu malfermis kaj tuj fermis la pordon. Mi certas, ke tio estis panjo.

Nia veterano

KORESPONDADO — EKZEMPLO DE PATRIOTISMO KAJ INTERNACIISMO

La multjara instruisto kaj kulturaganto Ivan Stojanov el Loveĉ estas konata kaj en sia naskiĝloko, kaj en Sumen, kaj en Rodopi-montaro, kaj en Loveĉ. Ĉar ĉie li lasis daŭrajn postsignojn. Sufiĉe estas nur rememorigi lian viglan agadon en vilaĝo Slatina, distrikto de Loveĉ. Tie li instruis kaj junulojn, kaj plenaĝulojn al bono kaj prudento dum tutaj dudek jaroj. Pli aĝaj vilaĝanoj certe memoras la prelegojn, kiujn la instruisto Stojanov lerte gvidis dum la jaroj de la Civitana Milito en Hispanujo. En Slatina li estis konata ankaŭ kiel legeja aktivulo kaj adepto de l'abstinula movado. Rezulto de sindona laboro ame al slatinanoj estas lia 600-paĝa verko „Kontribuo al la historio de v. Slatina“, kiu aperos libroforme nur post kelkaj monatoj.

Jam en 1921 j. en Loveĉ oni instruis fakultative en la gimnazio la Internacian Lingvon. Arkitekto Boris Ivanĉev estis la unua E-lektoro. Ĉe li la sciama gimnaziano Ivan Stojanov faris la unuajn paŝojn al ekposedo de E-o. Poste, en 1927 j., li pliriĉigis siajn lingvokonojn en la Pedagogia Instituto de Sumen. De tiam ĝis hodiaŭ, jam pli ol 50 jarojn, la ideo de paco, amikeco kaj internacia kunlaboro, al kiu servas la lingvo de d-ro Zamenhof, ne forlasis la grandan animon de tiu ĉi nobla instruisto. Ne per vortoj, sed praktike li strebas realigi tiun ĉi ideon — kiel instruanto de E-o, kiel multjara sekretario de la Distrikta Estraro de BEA en Loveĉ, kiel aktivulo

en la urba societo. Kaj plej multe — per leteraj kontaktoj kun e-istoj el la tuta terglobo.

Ivan Stojanov korespondas kun amikoj el pli ol 35 landoj — Sovetunio, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Italujo, Hispanujo, Finnlando, Brazilo, Argentino, Japanio kaj m.a. Signifaj estas ne nur la nombro de liaj korespondantoj, sed ankaŭ la temoj, kiujn li traktas en siaj leteroj. Li klarigas la lernejan sistemon, informas pri la deviga kaj senpaga kuracado, pri la favoraj pensiaj kondiĉoj, pri la socialisma konstruado en Bulgario. Konigante al siaj alilandaj amikoj la naturajn belecojn kaj la mildan klimaton de nia patrolando, la gastamon de nia pacama popolo, ĝiajn morojn kaj kutimojn, la fervora instruisto allogas novajn dezirantojn viziti nian turisman landon, akiras novajn amikojn de Bulgario.

Ege fervora estas lia interŝanĝo de E-eldonoj. Al Japanio, Francio, Kanado kaj aliaj landoj Ivan Stojanov sendas verkojn de niaj klasikaj kaj nuntempaj verkistoj kiel „Sub la jugo“ de Iv. Vazov, „Bofilino“ de G. Karaslavov, „La fonto de la Blankpiedulino“ de P. R. Slavejkov, la librojn „Bulgara Antologio“ de I. Krestanov, „Bulgara prozo“, la versokolektojn de Ĥr. Botev, Ĥristo Smirnenski, Nikola Vapcarov. Reciproke li ricevas valoran literaturon el eksterlando. Nun en lia riĉa biblioteko estas ĉirkaŭ 100 Esperantao-libroj, inter kiuj multe da



antologioj kiel ekzemple franca, pola, japana, ĉeĥa, estona, hungara, portugala, angla, svisa, sveda, finnlanda ka.

Al la franca instruisto Baronet, kursgvindanto kaj aŭtoro de Esperanta lernolibro,



Ivan Stojanov sendis la raporton de Todor Ĵivkov antaŭ la XI kongreso de BKP, tradukitan en E-on. Lige kun tio lia franca kolego ofte demandas pri la ekonomia stato de nia lando, pri la socia vivo. En sia lasta letero li skribas: „Kiel eblas instrui ĉe vi post emeritiĝo? Ĉu vi ne havas senlaborulojn? Tie ĉi neniuj pensiulo povas labori. Ni cedas la laborlokojn al junaj senlaboraj instruistoj.“

Multjare la presisto-komunisto el Parizo Jan Ser abonis pere de sia bulgara amiko la revuojn „Nuntempa Bulgario“ kaj nun „Bulgara Esperantisto“, el kiuj li ekscias la veron pri la socialisma sociordo.

Alloga kaj instrua estas la korespondado de Stojanov kun la japana e-isto Josiharo Sindo, kiu komenciĝis en 1944a kaj ankoraŭ daŭras. Multon oni povas ekscii el la interesaj kaj originalaj laŭ enhavo leteroj de Slatin Jurij-Nikolaj el Talino—Sovetunio, de Barbara Nemeĉ el Dombovar—Hungario, de Ante Vasanoviĉ el Split—Jugoslavio.

Jes, plurajn amikojn de Bulgario altiris la modesta kaj laborama instruisto kaj e-isto Ivan Stojanov. Ankaŭ nun, emerito, li daŭre faras sian „ambasadoran“ laboron, kiu estas inda ekzemplo de patriotismo, de amikeco kaj kunlaboro inter la popoloj.

Jlija Ivanov

Niaj amikoj pri ni

Nadia Andrianova, Kiev

SES SEMAJNOJN INTER AMIKOJ KAJ FRATOJ*

Jam ĉe mia unua vizito, kiu okazis en la ora, sunoriĉa aŭtuno de 1967, Bulgario min ĉarmis kaj gajnis por ĉiam mian koron.

Neforgeseblaj, feliĉaj dudek tagoj!

Tiam mi estis en turista grupo de tridek ukrainaj intelektuloj — ĵurnalistoj, inĝenieroj, kuracistoj, sciencistoj, oficistoj.

...Kun aparta intereso ni trarigardis Plevnen kaj Sipka-n. Monumentoj de eterna amikeco. Loko egale karaj kaj por la bulgara, kaj por la rusa popoloj. . .

Post la Dua Mondmilito aldoniĝis novaj monumentoj. La koro ne povas ne emociiĝi antaŭ la figuro de la juna soveta soldato Aljoŝa, postene staranta por ĉiam sur unu el la sep montetoj de Plovdiv — la Monteto de la Liberigintoj. . .

* La raportaĵo, sufiĉe granda, aperis en du numeroj (107 kaj 108/1978) de ĵurnalo «Naroden Drugar» (Popola Kamarado) — u. Jambol, de kie ni prenas ĉi fragmentojn.

Duafoje mi vizitis Bulgarion en 1976 — tiam mi restis ĉi tie tutan monaton. Denove estis milda ora aŭtuno. Multon mi vidis, multon eksciis kaj komprenis. Mi estas certa, ke mi bone ekkonis kaj profunde ekamis Bulgarion kaj la bulgarojn — tiel grandanimaj, gastamaj. . . Sofio, Vraca, La Roza Valo, Plovdiv, Panagjuriŝte, Velingrad, Batak, Peŝtera, Bansko. . . Vera tera paradizo estas Rodopi-montaro. Neniemi estis tiel impresita, kiel ĉi tie!

Kaj jen — mia tria vizito en la tiel kara por mi Bulgario — pli ol sessemajna!

Denove Sofio, poste la suna Varno. . . La 63a UK de E-o. Preskaŭ 5000 e-istoj el la kvin kontinentoj de la terglobo, reprezentantoj de ĉiuj rasoj, nacioj, religioj, sociaj sistemoj. Kaj ĉiuj ili interkompreniĝis per unu lingvo — Esperanto — bonega lingva rimedo, ponto por reciproka kompreniĝo, kunlaboro, amikeco inter la popoloj. . .

En la kongreso partoprenis pli ol 100-membra oficiala delegitaro de sovetaĵoj e-istoj.

Post la kongreso — mia individua turista programo. Denove La Roza Valo (Kazan-lâk, Mâgliĵ, Kalofer, Karlovo, Sopot), Stara Zagora, Sipka, Stoletoŭ, Gabrovo... Denove Plovdiv, Batak, Peŝtera, Velingrad, kaj fine — Burgas, kie mi partoprenis en la Internaciaj Kursoj por Instruistoj de E-o — vera E-Universitato. Streĉa lernado, kaj je la fino — sukcesa ekzameno kaj diplomigo kiel E-instruistino. Post Burgas,

responde al invito de E-amikino, mi gastis en Jambol, en tiu ĉarma suda urbo, kun tiel impona devizo: „Mi venas el la antikveco — mi iras en la estontecon“. Bakaĝik, Orman, Sakar, la templo-monumento „Aleksandro Nevski“, Jeravna, Kotel, la arkeologiaj esplorfosaĵoj en la antikva Kabile, la ekskluzive interesa etnografia muzeo en Elhovo, la novaj modernaj konstruaĵoj en Jambol kaj miaj novaj geamikoj en tiu urbo — ĉio ĉi restos por ĉiam en mia memoro. Por ĉiam!

МЕЖДУНАРОДНИ КУРСОВЕ ЗА ПРЕПОДАВАТЕЛИ ПО ЕСПЕРАНТО

6—25 август 1979, Бургас

Курсовете, организирани досега десет пѣти, се радват на широка популярност у нас и в чужбина. Благодарение на сериозно поставената в тях учебна работа и на ежегодното участие на около 200 души от десетина страни, те се превърнаха в авторитетна международна есперантска школа.

Тази година за българи ще се организират:

1. Групи I, II и III степен за изучаване на езика;
2. Група по методика на преподаването на есперанто със застъпване на историята на есперантското движение и литература.

В курсовете се приемат с предимство професионални учители. Приемат се и други лица, но поне със завършено средно образование. Тази година за пръв път ще се приемат и организационни активисти, за които в програмата са предвидени специални занимания. Приемането във II и III степен и в методическата група става въз основа на документ за взет изпит за предходната степен.

Ежедневно 4 учебни часа, останалото време — плаж, разходки, екскурзии и пр.

Краен срок за записване: 30 май.

Такса за българи: 80 лв. (храна, квартира, учебни и административни разноски). Суми се изпращат на адрес: ДС Каса Благоевски район, сметка 185/2553 на Окрѣжното есперантско рѣководство София.

За повече подробности се обрѣщайте кѣм: Окрѣжно есперантско рѣководство бул. Хр. Ботев 97, 1303 София (тел. 31-61-80).

Елате да се усѣвършенствувате като есперантисти и да се дипломирате като правоспособни преподаватели по есперанто в приятна международна среда! Елате да се подгответе по-добре като организационни работници на есперантското движение!



Lige kun la Internacia Jaro de Infano ni aranĝos oficiale ekspozicion pri la vivo kaj revoj de la infanoj en la tuta mondo.

Ni petas, sendu al ni por la ekspozicio ilustritajn infanlibrojn, infandesegnaĵojn ks. je adreso: Esperanto-Societo „Progreso“, 5180 Polski Trámbes, pk. 61, Bulgario. Ĉiu partopreno estos rekompencita!

Kurso ĉe E-societo „Juste.o“ en Varno. Kursgvidanto do. G. Dimov.

VERDA TABULO

En la abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto“ por 1979 aparte distingiĝis la **DISTRIKTO VARNŲ**. La esperantistoj de tiu distrikto varbis 401 abonantojn kaj tiel preskaŭ duobligis la donitan kontrolciferon (236). Aparte elstaras E-societo „Fajrero“ en la Distrikta Popola Soveto en Varno: ĝi kolektis 160 abonojn!

Brilajn sukcesojn atingis ankaŭ la E-societoj en la negrandaj urboj Kubrat kaj Gâlâbovo.

En **KUBRAT**, distrikto Razgrad:

por „Bulgara Esperantisto“ 161 (ankoraŭ por: „Paco“ — 26, „Esperanto“ de UEA — 15, „Juna Amiko“ 30, „der esperantist“ — 10, „Esperantisto Slovaka“ — 5 ka.)

En **GÂLÂBOVO**, distrikto Stara Zagora:

por „Bulgara Esperantisto“ 89 (ankoraŭ por: „Paco“ — 54, „Scienca Mondo“ — 42 ka.).

Ni sincere dankas kaj varme salutas niajn sindonajn samideanojn el la cititaj lokoj! Sekvu ilian noblan ekzemplon! Kolektu novajn abonojn!

Ni nepre atingu 6100!

Juna esperantisto

JUNULARA E-GRUPO EN VIDIN

La 22an de nov. 1978 en la salono de la distrikta junulara domo okazis kunveno de la junaj e-istoj el Vidin. Estis fondita junulara E-grupo ĉe societo „Espero“. Ĉeestis ĉ. 60 gejunuloj, veteranoj kaj simpatiantoj de E-o.

Estis farita raporto je temo „Kion ni scias pri la internacia lingvo E-o“. Oni akceptis agadplanon de la grupo. Kiel prezidanto estis elektita Verĝinija Dokova.

Fine de novembro V. Dokova reprezentis la e-istojn de Vidin en konferenco de ĝemelaj urboj Sverin (GDR), Vidin (Bg), Pila (Pl), Talin (USSR), Sĉeĉin (Pl) kaj Peĉ (H). La konferenco okazis en Sverin.

V. D.

VESPERO JE TASO DA TEO

Fine de la pasinta jaro en la junulara domo „Liljana Dimitrova“ la sofiaj junulara kaj studenta E-societoj organizis kunvenon, en kiu k-do Nikola Aleksiev — honora prezidanto de MEM kaj multjara prezidanto de BEA, rakontis rememorojn el sia riĉenhava E-vivo.

Aparte ekinteresis la ĉeestantojn la agado de la Laborista E-Asocio (LEA), kiu ekzistis dum la periodo 1930—1934. Ĝi eldonis la ĵurnalojn „Balkana Laboristo“, „Mejdunaroden ezik“ (Internacia Lingvo) kaj „Mejdunaroden Rabselkor“ (Internacia Labo-

rista-Kampanara Korespondanto). Tiu lasta regule aperigis korespondaĵojn de progresemaj eksterlandaj e-istoj pri la klasbatalo en diversaj landoj.

K-do Aleksiev rakontis ankaŭ pri sia partopreno en la 39a UK de E-o en Malmö (Svedio) en 1948 kaj en la 59a UK en Hamburgo (FRG) en 1974.

Per ĉi tiu aranĝo, kiu trapasis en agrabla etoso ĉe taso da teo, estis lanĉita la iniciato de ambaŭ societoj pri kolektado de rememoroj de e-istoj veteranoj.

E. G.

KVARFOJE LABORBRIGADANO EN BULGARIO

Lia nomo estas Laszlo (Laslo) Földvari el u. Turkeve, Hungario. Li estas estro de vagonaro kaj havas eblecon ofte veturi. Sed ne nur profesie. Laszlo estas agema e-isto kaj ofte vizitas diversajn E-aranĝojn en ĉiuj landoj.

En Bulgario ĝis nun Laszlo estis sesfoje. La sepan fojon tiu ĉi simpatia hungaro gastis en nia antikva ĉefurbo Veliko Târnovo kiel delegito de la 34a kongreso de TEJO.

La hungaro Laszlo jam havas multajn geamikojn en nia lando. Li korespondas kun e-istoj aŭ persone konas e-istojn el preskaŭ ĉiu pli granda nia urbo.

Kiamaniere Laszlo havas tiel viglajn kontaktojn?

Kvarfoje li partoprenis E-laborbrigadon en nia lando. Li estis en Karlovo, en

Marica, en Kaliakra, en Ĉerven—ĉie, kie dum la lastaj jaroj la junaj bulgaraj e-istoj kaj iliaj eksterlandaj amikoj donis siajn fortojn kaj entuziasmon por konstrui socialismon en nia lando.

— Mi plezure laboris en Bulgario por

konstruado de nova vivo. . . — diras Laszlo kaj ridetante aldonas: — Mi jam amas vian landon kiel mian duan patrujon. Mi traveturis preskaŭ tutan Bulgarijon — nur unu-du regionoj restis nevizititaj ĝis nun, sed mi kredas, ke estonte mi ankaŭ ilin vizitos. . .

Cočo Kolarov

TEJO KAJ TIES EKSTERAJ RILATOJ

La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) fondiĝis en 1938 j. En 1956/57 ĝi estis reorganizita kiel junulara sekcio de Universala Esperanto-Asocio (UEA). La 16a Internacia Junulara E-Kongreso en Rotterdam (1960) markis finon de la periodo de interna reorganizo. Komenciĝis nova periodo, dum kiu TEJO efektive plenumas siajn taskojn. Unu el la punktoj de ĝia ampleksa laborplano estas la informado al neesperantistaj junularaj organizoj (NEJOj).

En 1962 la NEJO-agado estis formulita kiel speciala kampanjo. TEJO kondukis oficialajn intertraktojn kun la Monda Junulara Asembleo (Bruselo), Monda Federacio de Demokrata Junularo (Budapeŝto) kaj Internacia Studenta Unio (Prago). La jaro 1964 estis signifoplena pro la komenciĝo de sistema kaj preskaŭ profesinivela TEJO-agado. Pluraj internaciaj junularaj organizaĵoj estis reprezentitaj en la 20a IJK de TEJO en Amsterdamo, pri kiu poste aperis franclingva dokumentaro.

En 1966 la NEJO-komisiono komencis organizi seminarion por funkciuloj de neesperantistaj junularaj organizaĵoj. Tia interŝanĝo de spertoj kaj administra tekniko plenigis mankon forte sentatan inter la junularaj organizaĵoj.

La profundaj sociaj ŝanĝoj kaj la vekigo de la tutmonda junularo dum la sesdekaj jaroj ne preterpasis ankaŭ TEJO-n. Ĝi konsciiĝis, ke necesas ankaŭ vastigi la fundamentajn principojn, sur kiuj la Junulara E-Movado konstruas siajn organizajn formojn. TEJO fariĝis pli aktiva kaj agema, precipe pli socie respondeca en ĉiuj flankoj de sia agado. Ĝi sekvis la vojon al socia aktivigo per la Deklaracio en la 25a IJK en Tyresö (Svedio) en 1963. Post Tyresö ankaŭ la

NEJO-komisiono de TEJO akiris novan vojon, difinante sian celon ĉefe „protesto kontraŭ kultura kaj lingva superregado“.

Specifa celo de la nuntempa Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) estas la atentigo pri la politikaj flankoj de la lingva problemoj kaj la esplorado pri diversaj aspektoj de la lingva subpremado. La agado de KER certe disvastigas la konon pri la ekzisto de TEJO (kaj Esperanto) en pluraj interesaj junularaj medioj. La komisiono, kiu havas propran oficejon kaj deĵoranton, organizas seminarion pri diversaj aspektoj de la lingva problemoj kaj lingva diskriminacio. KER ankaŭ sendas reprezentantojn al internaciaj konferencoj de junularaj organizoj kaj instigas la landajn sekciojn de TEJO studi la sociajn sekvojn de la lingva problemaro.

La Komisiono pri Eksteraj Rilatoj eldonas periode la gazeton „Sufoko“, kiu publikigas nacilingvajn artikolojn pri lingvaj problemoj kun tradukoj en Esperanton, kaj estas uzbla kiel diskutmaterialo en klubaj vesperoj kaj renkontiĝoj. Alia eldonaĵo estas la bulteno NNN (Nouvelles, News, Novaĵoj) en la franca kaj angla lingvoj, kiu prezentas la laboron de TEJO kaj ties landaj sekcioj kaj komentas la nunan lingvan situacion en diversaj partoj de la mondo.

En la 34 IJK en Veliko Târnovo oni elektis la jenan konsiston de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj: gvidanto Csaba Lendvay (Hungario), membroj Johano Moreto Reventos (Hispanio), Jan Tarrent (Britio), Jim Cushing (USA), Giorgio Silber (Italio), Janet Sly (Britio), Imre Szabo (Hungario), Tibor Vasko (Hungario), Ludoviko de Yzaguirra (Hispanio), Walter Zelazny (Pollando).

Evgeni Georgiev

Karaj junaj samideanoj,

Ekde numero 1/1979 „Bulgara Esperantisto“ komencis aperigi la rubrikon „Juna Esperantisto“. La redakcio deziras, ke tiu rubriko estu regula en ĉiu numero, ke ĝi estu varia, interesa kaj utila. Tio ne povas okazi sen via kunlaborado. Do kontribuu al la rubriko per raportaĵetoj el la vivo de via junulara grupo aŭ societo, per skizoj pri junaj aktivuloj, per beleto — originala kaj tradukita (ĉe tradukoj ĉiam sendu ankaŭ la originalon!)

Adreso! **LA REDAKCIO DE „BULGARA ESPERANTISTO“, BUL. ĤRISTO BOTEV 97, 1303 SOFIO.**



Konstanta adreso: *Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando*
Adreso de LKK: *Esperanto, Poŝtfako 14, CH-6512 Giubiasco, Svislando*

El „OFICIALA KOMUNIKO № 2“

Denove Esperantologia konferenco. Pro la granda populareco de la Esperantologia Konferenco dum la 63a UK en Varno, la Konferenco havos sian duan sesion en Lucerno. Interesitaj esperantologoj sendu prelegproponon (kun titolo, kelklinia resumo kaj konsizaj indikoj pri la faka kompetento de la proponanto) al la organizanto, d-ro Detlev Blanke, CLE Esperanto, Charlottenstr. 60, DDR-108 Berlin, Germana DR.

Porinfana literaturo ĉe Belartaj Konkursoj. Okaze de la Internacia Jaro de Infano, Belartaj Konkursoj dediĉos apartan branĉon al la literaturo porinfana. Povas temi pri diversspecaj literaturaĵoj (fabelo, novelo, poemo, kanto, dramo), laŭ la teknikaj normoj de la responda „plenaĝula“ branĉo de BK. Oni sendu ĉiujn konkursaĵojn en kvar ekzempleroj al la sekretario de BK, s-ro Alec Venture, 7 Grosvenor Road, Wallington, Surrey SM6 0EG, Britujo. Ĉiuj verkoj devos lin atingi ĝis la 31a de marto 1979.

Artaj aranĝoj en preparo. LKK jam cirkuleras al artistoj pri prezentoj en la Internacia Arta Vespero kaj aliokaze en Lucerno, sed povus esti, ke kelkajn talentulojn ĝi pro iu aŭ alia kaŭzo malsukcesis trafi. Sinproponoj (kun detaloj pri la eventualaj prezentaĵoj kaj kun financaj kondiĉoj de la artisto) iru al la LKK-ano respondecas pri IAV, s-ro Momĉilo-Moŝa Pavloviĉ, Rosentalstr. 70, CH-8400 Winterthur, Svislando.

Internacia junulara kongreso: aperis dua informilo. Ĝus aperis en 4000 ekz. okpaĝa „dua informilo“ pri la 35a Internacia Junulara Kongreso (Aŭsterlico, Nederlando, 1979.07.20—27). Interesitoj petu ekzempleron aŭ stokon ĉe 35a IJK 1979, Postbus 4083, 9071

EB Groningen, Nederlando.

La konata trupo TESPAREgalos la Kongreson per prezento en la subĉiela teatro de la kastelo de Vilhelmo Grafo de Nassau. Dum la tuttaga ekskurso IJK-anoj konatiĝos kun la tradiciaj energirimedoj de Nederlando — la ventmueliloj. Oni vidos ankaŭ polderojn (eksmarfundojn, kiuj post dreniĝo fariĝis fekunda farmtereno) kaj polderigotajn marpartojn. La ekskurso krome trapasos pitoreskajn urbetojn de meza kaj okcidenta Nederlando.

„Interŝtataj unuiĝoj — kiucele?“ estas temo de la 35a IJK. Ĉu la homoj vere komencas senti sin anoj de io pli vasta ol ŝtato? Kiujn kulturajn, sociajn kaj lingvajn ŝanĝojn kunportas membreco en ekonomia unuiĝo, kaj ĉu tiuj ŝanĝoj minacas la nacian kaj etnan identecon? Ĉu la nunaj unuiĝoj ne havas disigan efikon, solidargante iujn ŝtatojn cele al konkurencado kontraŭ aliaj? Ĉi tiujn kaj rilatajn demandojn traktos laborgrupoj de la 35a IJK, rigardante al la Eŭropa Ekonomia Komunumo, la Konsilio por Reciproka Ekonomia Helpejo, la Organizaĵo de Nafto-Eksportaj Landoj ka..

Kvindek lokoj en Infankongreseto. Pro la kvanto de disponeblaj dormlokoj, la 17a Internacia Infana Kongreseto akceptos nur kvindek partoprenantojn. La kotizo, kiu inkluzivas loĝadon, manĝojn kaj la programon (kun ekskursoj al la Transportmuzeo de Lucerno kaj, boate, sur la Kvarkantona Lago) estas 180 sv. fr. (160 sv. fr. por gefratoj kaj lernejaranoj).

Internacia teamo de prizorgantoj jam varbiĝas. Se vin interesas helpi en la Kongreseto, skribu al LKK kun indikoj pri viaj kvalifikoj.

Lige kun la Internacia Jaro de la Infano internacian ekspozicion de infanpenetraĵoj pri la temo „Mia mondo“ aranĝos klubo „Agora“ en Bidgoŝĉ, Pollando. Ĉiu partoprenanto ricevos esperantlingvan albumon pri d-ro Januŝ Korĉak—granda amiko

de la infanoj. La ekspozicio okazos enkadre de la „Tagoj de Bidgoŝĉ—79“.

Infanoj el tutmondo, sendu viajn penetraĵojn ĝis la 15 de majo 1979 je adreso: Klubo „Agora“, str. M. Skłodowskiej—Curie 56, PL 85-088 Bydgoszcz, Pollando.

LA SOVETAJ ESPERANTISTOJ*

Laŭ tre neplenaj donitaĵoj, en Sovetunio estas pli ol 10 000 e-istoj, inter kiuj pli ol 3000 estas aktivuloj. E-klubo kaj grupoj funkcias en 110 urboj kaj vilaĝoj.

La sovetianoj utiligas E-on por fortigi la pacon kaj la amikajn ligojn kun siaj eksterlandaj kolegoj, por klarigi la internan kaj eksteran politikon de la soveta ŝtato. „E-o servas al la paco!“ — tio estas ilia slogano.

Ĉiujare en Sovetunio venas personoj, kiuj parolas E-on kaj ne bezonas interpretiston por konversacii kun la sovetaj civitanoj. La plimulto de la vizitantoj post la reveno en siajn loĝlokojn skribas leterojn plenajn je entuziasmo, montrante, ke tiuj renkontiĝoj helpis al ili kompreni multe pli bone Sovetunio kaj ĝiajn homojn kaj senmaskigi la antisovetajn mensogojn de la malamikoj de la paco kaj de la malstreĉiĝo en Okcidento. Niaj e-istoj partoprenas en la ĉiujaraj renkontiĝoj de gvidantoj de la E-organizaĵoj de socialismaj landoj, kiuj estas okazigataj laŭvice en la ĉefurboj kaj la plej gravaj urboj. En 1976 j. tia renkontiĝo okazis en Moskvo.

Estas subtenataj kontaktoj kun la Universala Esperanto-Asocio (UEA). Tiu organizaĵo havas pli ol 3500 delegitojn en 64 landoj kun la celo helpi al la e-istoj, kiuj vojaĝas al aliaj landoj. En Sovetunio estas delegitoj de UEA en pli ol 30 urboj.

La sovetaj e-istoj partoprenas la studadon de sciencaj problemoj, ligitaj kun la interlingvistiko, scienco, kiu studas la evoluon de la internaciaj lingvoj en metodologia, filozofia, sociologia kaj pure lingvistika aspektoj. Laŭ decido de la Akademio de Sciencoj de USSR, la Sekcio de Literaturo kaj Lingvoj kaj la Instituto de Lingvoscienco ĉe la Akademio de Sciencoj estas komisiitaj „studi la problemon pri la kreo de helpa lingvo por internacia komunikado kaj la eblecojn utiligi ĝin en la nuntempaj kondiĉoj“. En la Instituto de Lingvistiko estis kreita grupo por studado de la problemo, gvidata de doktoro de filologiaj sciencoj prof. M. I. Isaev. Tiu ĉi grupo publikigis la unuan kolekton de artilokoj sub la titolo „Problemoj de la Interlingvistiko“, pruvanta, ke la internacia lingvo E-o respondas al la postuloj, kiuj povas esti meti-

taj al unu rimedo de internacia komunikado en la diversaj sferoj de la vivo de la nuntempa socio.

La sovetaj e-istoj partoprenas aktive en la laboroj de MEM. Kvin sovetianoj estas membroj de la estraro de tiu ĉi organizaĵo. En Sovetunio estis eldonitaj kvar numeroj de revuo „Paco“, kiu estas publikata sub la sama titolo en diversaj socialismaj kaj kapitalismaj landoj. Krome, en USSR aperis 13 numeroj de revuo „Por la paco“.

En nia lando estas eldonitaj en E-o vico de gravaj politikaj dokumentoj, inter kiuj estas la raportoj kaj paroladoj de L. I. Breĵnev, ĝenerala sekretario de CK de la Komunista Partio de Sovetunio, la materialoj de la XXVa kongreso de KPSU, la Konstitucio de USSR ka.

Kune kun siaj slovaka kolegoj la sovetaj e-istoj tradukis la Finan Akton de la Tuteŭropa Konferenco, okazinta en Helsinko, kiu estis eldonita en Ĉeĥoslovakio kaj disvastigita en la tuta mondo, inkluzive en tiuj landoj, kie tiu ĉi dokumento ne estis publikita en la naciaj lingvoj. Estis eldonitaj ankaŭ dekoj da tradukoj de la verkoj de plej elstaraj sovetaj verkistoj: Gorkij, Majakovskij, Ŝoloĥov, Esenin, Lavrenjov kaj multaj aliaj.

Konsiderinda estas la literatura kaj eldona aktiveco de la e-istoj de Sovetaj Estonio kaj Latvio.

Meritas noti ankaŭ la agadon, kiun disvolvas la junaj sovetaj e-istoj, grupiĝintaj en la Soveta Esperantista Junulara Movado (SEJM). En tiu movado partoprenas pli ol 2500 gejunuloj el 44 urboj de nia lando.

SEJM subtenas kontaktojn kun la esperantista junularo de aliaj landoj, efektivas sciencajn laborojn en rondoj kaj grupoj por studado de E-o, por tradukoj en tiun ĉi lingvon de soveta politika literaturo kaj soveta fikcio, por komponado de junulaj kantoj, ellaborado de scienca-teknika terminaro por diversaj sferoj de la scienco kaj tekniko ktp.

Ĉiujare estas okazigataj kunvenoj de la junaj e-istoj, kiuj ĝuas grandan popularecon. En ili partoprenas centoj da junuloj de ĉiuj anguloj de nia lando.

En Latvio, Litovio kaj Estonio ĉiujare estas organizataj kunvenoj de e-istoj de ĉiuj aĝoj, en kiuj partoprenas kutime ĝis 300 personoj el diversaj urboj de Sovetunio.

Je la 4a—5a de febr. 1978 al la 12 radiostacioj en la mondo, kiuj disaŭdigas en

* La artikolo estis publikita en n-ro 29/1978 de «Moskvaj Novaĵoj» laŭ la peto de Petik Janes el H ngario.



Esperanto, aliĝis la radiostacio Moskvo: estis efektivigita eksperimenta disaŭdigo por Eŭropo pri la agado de la sovetaj e-istoj. La reago de la eksterlandaj aŭskultantoj superis ĉiujn atendojn. Pli ol 600 personoj de preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj, aŭskultinte tiun ĉi programon, konfirmas la bonan aŭdeblecon kaj petis daŭrigon de la disaŭdigoj.

La sovetaj e-istoj starigas antaŭ si grandajn kaj seriozajn taskojn: plifortigi la

„LIR O-78“

Je la 16—17 de dec. 1978 E-klubo „Malahita Stelo“ en u. Mias, Suda Uralo, estis dommastro de la jam tradicia E-renkontiĝo „Liro-78“. Partoprenis 77 e-istoj el 9 urboj. Venis gastoj eĉ el Moskvo kaj Siberio. La renkontiĝo okazis en pitoreska loko apud lago Ĉebarkulj. Ĉefa temo estis: „Homaj rajtoj kaj Esperanto“.

La programo de la renkontiĝo estis varia kaj tre interesa por ĉiuj. La ĉefdelegito de UEA Boris Kolker rakontis pri la 63a UK en Varno kaj projekciis diapozitivajn pri ĝi kaj pri Bulgario ĝenerale. Estis projekciitaj ankaŭ filmoj pri pasintaj renkontiĝoj kaj E-tendaroj. Estis aranĝita fotoekspozicio pri „Liro-77“. La koncerto, prezentita de mastroj kaj gastoj, estis tre gaja kaj amuza; ĝin spektis ankaŭ neesperantista publiko. Okazis ankaŭ komuna fotado, promenado en freŝa aero kaj komunaj E-ludoj.

La plej grava parto de la renkontiĝo tamen estis la poezia konkurso „Liro-78“. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 50 personoj (11 foreste) el 14 urboj. La konkurso havis jenajn branĉojn: 1) originala poezio, kantotekstoj kaj melodioj por esperantlingvaj tekstoj; 2) tradukitaj poezio, kantoteksto; 3) recitado de poeziaĵoj kaj plenumo de kantoj.

En ĉiuj branĉoj de la konkurso aperis novaj talentoj. Ĝuste pro tio estis fiksita speciala premio „Nova talento“.

T. Koptjagina

VERDA AVO FROSTO

Ĉi-jare la anoj de la E-klubo de Ĥarkovo (USSR) decidis inviti al la festo, organizita dediĉe al la Nova Jaro, Avon Froston kaj Neĝulinon, ĉiamajn partoprenantojn en similaj aranĝoj (nur esperantistoj ĝis nun ial festis sen ili). Kaj la invititoj venis. Dum la tuta vespero ili gajigis la ĉeestantojn, partoprenis diversajn ludojn, enmanigis la atestojn al kursfinintoj ktp. Al la e-istoj tre plaĉis la ideo inviti tiom popularajn heroojn kaj ankaŭ la E-parolo de la gastoj. Avo Frostoj kaj Neĝulino ne restis indifereantaj: ili montris sian amon al la e-istoj kaj promesis sekvontjare denove veni al la festo.

D. Cibulevskij

organizacion de la Movado, plialtigi ĝian ideologian-teorian nivelon por batali por malstreĉiĝo kaj paco, por malarmado, kontraŭ la reakciulara ideologio; stimuli ankoraŭ pli intimajn kontaktojn kun la E-movado en la socialismaj landoj; partopreni pli aktive en la internacia E-movado, unuafoje en MEM, eldonadi regule sovetajn E-revuojn.

El la hispana versio tradukis:

D. Haĝiev

2-A INTERNACIA MEDICINA E-KONFERENCO (IMEK)

8—14 de julio, Hungario

La Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEK), la Medicina Fakkomisiono de HEA kaj ĝia fakgrupo aranĝos la 2-an IMEK en u. Hódmezővásárhely, en la sudo de Hungario, proksime de u. Szeged, inter la 8a kaj 14a de julio 1979.

La konferencaj ĉeftemoj estas: 1) Sanitara prizorgado kaj sociala asekurado, 2) Protektado de la medio.

Medicinistoj, kiuj deziras prelegi dum la 2a IMEK, estas petataj skribi al la Organiza komitato, menciante la titolon de sia prelego.

En la kadro de la 2a IMEK okazos, krom la sciencaj prelegoj, vizito de muzeoj kaj sciencaj institutoj, diversaj kulturaj programoj (balo, folkloro vespero, modrevuo) kaj du ekskursoj.

La partoprenkotizo estos ĉ. 900—1400 forintoj.

Aliĝiloj kaj detalaj informoj estas riceveblaj de: s-rino Katalin Faragó, pf. 89, H-6801 Hódmezővásárhely, Hungario.

PROFESIA BUROO POR INTERNACIA INTERŜANĜO ĈE PEA

La Pola E-Asocio starigis leĝe registritan buroon por interŝanĝo kun eksterlando. La buroo subskribis la unuajn interkonsentojn por sendeviza interŝanĝo de E-grupoj kun E-organizaĵoj el Jugoslavio, Hungario, ĈSSR, Bulgario, Finnlando ka.

En la buroo jam laboras tri salajrataj ofistoj.



Turkeve, decembro 1978
Estimataj gesamideanoj,

La 3-an de aŭgusto 1977 finiĝis la Dua Internacia E-laborbrigado en Turkeve. La brigadon partoprenis 64 gesamideanoj el 5 landoj. Laŭ la opinioj de la partoprenantoj kaj la organizantoj ankaŭ ĝi estis sukcesa.

En 1978 ni ne aranĝis laborbrigadon, ĉar ni partoprenis TEJO-kongreson en Bulgario kaj poste preparis la brigadrilatan kunlaboron inter la Centra Komisiono de Hungara Komunista Junulara Asocio kaj la Hungara Esperanto-Junularo (HEJ).

Laŭ la atingita interkonsento, la unua komuna laborbrigado okazos en u. Békéscsaba en aŭgusto 1979 sub la nomo: I Centra Internacia E-Laborbrigado.

Kun la espero, ke tiu ĉi brigado estos pli bona (ja ĝi estos la plej granda) ol la antaŭaj, mi salutas vin

Földvári László

I CENTRA INTERNACIA ESPERANTO-LABORBRIGADO

11—28 de aŭgusto, Békéscsaba

Kolektiĝo la 11an de aŭgusto, forveturo la 28an de aŭgusto — 13 labortagoj. Dum la labortagoj oni laboros 7 horojn en konservfabriko. Loĝado en moderna studenta hejmo. Manĝado kvarfoje tage. Ĉiuj ricevos laborvestaĵojn, ŝuojn. Estos laborkonkurso kun monpremioj. La liberan tempon oni uzos por ekskursoj, prelegoj, muzik- kaj dancvesperoj. La lastaj tagoj restos por ekskurso.

Partoprenkotizo ne estas. La brigadanoj ricevos asignon por la veturado en Hungario.

Limdato de aliĝo: la 1a de junio 1979. Al la aliĝintoj oni respondos post tiu dato. La brigadanoj devas esti minimume 16-, maksimume 25-jarj kaj devas paroli Esperanton.

Korespondadreso: *Földvári László, Turkeve, Árpád u. 11, 5420 Hungario.*

KONCIZE

● Prelego pri Islando kaj la 62a UK de E-o en Rejkjaviko faris en Drjanovo doc. Georgi Dimov.

● En la Distrikta Domo de Instruisto en Pleven okazis kunveno, en kiu pri la eduka valoro de E-o parolis Kunčo Válev. La kunveno estis organizita de la Sekcio de Instruistoj-Esperantistoj ĉe la Domo.

● En Jambol gastis la polaj e-istinoj Mariana Szywanska el Gdansk kaj Barbara Grabinska el Brwindw. Okazis interesa kunveno kun la lokaj e-istoj.

Hristo Nikolčev
*sekretario de la Asocio
de Bulgaraj Filatelistoj*

FILASERDIKA — 79

vitrino de la monda filatelo

1979 jaro estas signifoplena por la bulgara filatelo — pasis 100 jaroj ekde la apero de la unuaj poŝtmarkoj en nia lando. Tiun jubuleon oni celebros per organizo de la tutmonda filatela ekspozicio „Filaserdika 79“. Sofio fariĝas duafoje (post 1969 j.) centro de la internacia filatelo. Pri tio malmulte da ĉefurboj en la mondo povas fieri.

La ekspozicio estos organizita de la Asocio de Bulgaraj Filatelistoj kun la aktiva helpo de la Ministerio de Komunikoj. Ĝin aŭspicias la Internacia Filatela Federacio kaj ĝi pasos sub la devizo: „La filatelo — por paco kaj amikeco!“

„Filaserdika — 79“ estos aranĝita en la du plej grandaj haloj de la ĉefurbo — „Universiada“ kaj „Festivala“. Ĝi ampleksos pli ol 1000 ekspoziciajn tabulojn. Sur ili oni eksponos pli ol 1000 kolektojn de filatelistoj el ĉ. 50 landoj. Krome siajn eksponaĵojn montros ankaŭ poŝtistaj administracioj, membrantaj en la Universala Poŝtista Asocio. Do, la vizitantoj vidos pli ol unu milionon da poŝtmarkoj — fakte pli grandan parton el ĉiuj markoj, eldonitaj en la tuta mondo ekde 1840 j. ĝis hodiaŭ.

Ĉefa mezurilo tamen pri la nivelo de kiu ajn tutmonda ekspozicio estas la kvalito kaj la malofteco de la eksponitaj materialoj. Tiurilate en „Filaserdika — 79“ estos multo vidinda. Allogos en haloj „Universiada“ kaj „Festivala“ la elstaraj kolektoj de la Muzeo de Komunikoj de USSR, la Brita Muzeo, la Sveda Muzeo kaj la poŝtista Muzeo de Budapeŝto. Krome oni atendas la kolekton de la granda nederlanda filatelisto Jan Puli, entenanta ekskluzive maloftajn kaj valorajn materialojn, ligitajn kun la historio de la poŝto en Bulgario, la kolekton de prof. A. S. Georgievskij el Leningrado — provojn kaj projektojn de la unuaj bulgaraj poŝtmarkoj, emisiitaj en Peterburgo tuj post la Liberigo de Bulgario el la otomana jugo (1878 j.) ka.

La Asocio de Bulgaraj Filatelistoj faras ĉion eblan, por ke la bulgara partopreno havu la necesan nivelon. Oni aparte kalkulas je la valoregaj kolektoj de d-ro Teodor Popov, Vasil Karaivanov, Andrej Penčev, d-ro Dimitro Kraev k. a., kiuj alportis altajn distingojn por nia lando el diversaj internaciaj ekspozicioj.

Aparte riĉa kaj varia estas la programo dum la tagoj inter la 18—27 de majo. Oni antaŭvidas la okazigon de la 48a kongreso de FIP, la XIIan konferencon de la Junulara Komisiono ĉe FIP, kunvenos de la pre-



zidantoj de filatelaj asocioj el la socialismaj landoj. Distroj per funkciigo de balonoj kaj transporto de poŝtaĵoj per malnovaj aŭtoj kaj speciala kaleŝo kreas interesan efekton ĉirkaŭ la ekspoziciaj haloj.

Tre granda estas ankaŭ la intereso al la poŝteldonaĵoj pri la ekspozicio, kiujn preparas la Ministerio de Komunikoj. En 1978 j. aperis kvar ekstraj serioj de poŝtmarkoj kun la emblemo de la impona filatela aranĝo. Tri novaj eldonaĵoj ornamas la kolektojn de la multnombraj ŝatantoj de poŝtaj miniaturoj en 1979 j. Antaŭstaras la eldono

de specialaj kovertoj, poŝtkartoj kun surprisita taksa signo ka.

La signo, la emblemo kaj la vinjeto de la ekspozicio estas faro de la elstara majstro de la aplika arto — la popola pentristo Stefan Kânĉev.

La intereso al „Filaserdika 79“ kreskas ĉiutage. Tio signifas, ke la vortoj de Georgii Dimitrov — „La poŝtmarko — tio estas la vizitkarto de nia lando“ — ricevos novan signifon: „Bulgario dum 1979 — vitrino de la tutmonda filatelio!“

Ni recenzas

ĈU NEŬTRALECO KAJ PASIVECO RILATE PACPROBLEMOJN DECAS AL LA ESPERANTISTOJ?

En 1978 j. la Mondpaca Esperantista Movado (MEM) celebris sian 25-jariĝon. Okaze de tiu ĉi jubileo la Ĉeĥoslovaka MEM-Sekcio eldonis la broŝuron „Koncize pri MEM“. Ĝin redaktis Oldrich Knichal, ilustris J. Klement.

La broŝuro enhavas kvar artikolojn: „Sur la vojo al naskiĝo de MEM“ de William Gilbert, „Misio kaj celoj“ de Nikola Aleksiev, „Historia skizo“ de O. Knichal kaj „Aktiva parto de la monda pacmovado“ de Semjon Podkaminer. La broŝuro estas riĉe ilustrita.

La unuaj du artikoloj donas respondon al la demando, kio necesigis la fondiĝon de esperantista pacmovado. Klare ili montras la kaŭzojn: la kreĝinta post la Dua Mondmilito danĝera internacia situacio, kiu minacas la mondon per nova milito; 2) la neŭtraleco de UEA. En la artikolo „Misio kaj celoj“ Nikola Aleksiev citas la vortojn de katolika pacbatalanto el Aŭstrio: „Ĉu la atombomboj faros diferencon inter katolikoj kaj komunistoj?“ kaj donas bonan respondon al iuj klasike neŭtralaj e-istoj, al kiuj MEM ŝajnas tro politika, tro maldekstra aŭ simple komunistema. Li konkludas, ke „la neŭtralismo rilate pacproblemojn estas fakta pasiveco en la akrega batalo inter la pacbatalantoj de ĉiuj ideaj nuancoj kaj la militinstigantoj“, ke simila fakta pasiveco ne konvenas al la ardaj pacbatalantoj, kiaj sendube estas la e-istoj. „E-o povas evolui kaj gajni solidajn socialajn poziciojn normale nur en mondo sen armiloj kaj militoj.“

La citita artikolo de Aleksiev skizas la karakteron, la celojn kaj la ideologian bazon de MEM. MEM agas kiel movado. Multaj fundamentaj trajtoj de ĝia ideologio estas prenitaj el la ideologia bazo de la fondita en 1949 j. monda Movado de la Pac-

adeptoj frunte kun la Monda Packonsilio (MPK) kiel ekzemple: la ideo pri aktiva partopreno de ĉiuj pacadeptoj en diversaj formoj de pacbatalo, sendepende de la individuaj politikaj, religiaj, filozofiaj kaj aliaj konceptoj; la elmontro de la imperiismo, koloniismo kaj novkoloniismo kiel ĉefamilitinstiganto; la principo, ke ne estas ebla kia ajn neŭtralismo rilate la problemojn de paco kaj milito. Al tiu ideo bazo la iniciatintoj de MEM aldonis iujn specifajn trajtojn, ĉerpitajn el la internacia E-movado: neceso aktive partopreni en la batalo por konservo de la paco kune kun diversaj neesperantistaj pacmovadoj, aktive partopreni en diversaj praktikaj formoj de pacbatalo, neceso batali kontraŭ la ideologio de faŝismo, kiu iniciatis la Duan Mondmiliton. La vivo konfirmis tiun idean bazon kaj montris ĝian utilon kiel por la komunaj intereso de la homaro, tiel ankaŭ por tiuj de la internacia E-movado.

La artikolo de O. Knichal skizas koncize la plej gravajn momentojn el la historio de MEM, dividante ĝin je kvin periodojn. La plej grava momento estas la rekono de MEM fare de la Monda Packonsilio en 1971 j., kiam MEM fariĝis ties membro, kaj ĝia prezidanto estis elektita en la gvidorganojn de MPK. La artikolo de S. Podkaminer kompletigas la artikolon de Knichal, indikante la aktivan partoprenon de MEM en la diversaj kampanjoj por defendo de la paco. S. Podkaminer plenrajte konkludas: „Sukcesaj aktivadoj de MEM rilate aplikadon de E-o kiel pontlingvo ne nur multoble pligrandigos ties aŭtoritaton en la pacmovado, sed ankaŭ montros la vojon al aliaj internaciaj organizaĵoj, suferantaj pro multlingveco, kaj helpos monds kalan agnoskon de E-o.“

Dimitro Haĝiev

Verdaj steloj

Veselin Andreev

BISTRE

Iun someran vesperon mi iris al renkontiĝo kun eksterleĝa kamarado. Marŝante malrapide, mi ĉirkaŭrigardis, ĉu iu polica agento ne spionas min. Nenia atento al la infanoj, kiuj ludis sur la strato. Subite pilko frapis min ĉe la kapo. Mi ĉirkaŭrigardis — Bistre. Kurante por preni la pilkon, ŝi flustris al mi sen rigardi min:

— Fuĝu! Oni arestis mian pli aĝan fratinon. Hejme estas policanoj.

Poste ŝi diris laŭte:

— Pardonu, oĉjo, tute hazarde. . .

Mi nur diris: „Ne gravas, ne gravas, knabineto!“ kaj forpasis trankvile. Ekirinte laŭ la najbara strato, mi ekrapidis por averti miajn kamaradojn. Kaj mi klare imagis, kiel la policanoj insidas ĉe ili por kapti ĉiun, kiu serĉas Lina-n. Bistre petis ilian permeson ludeti iom kun la infanoj. Tiuj pensis: kion povas fari tiu ĉi bubo. . . Nur ili ordonis, ke ŝi al neniŭ diru ion ajn kaj ludu antaŭ iliaj okuloj. Se ne, ankaŭ ŝin oni forkondukos. . .

— Ah, Bistre, Bistre! Kiel ruze vi trompis ilin kaj savis ne nur min!

El la bulgara: Vasilka Penĉeva

Por prilaborata bibliografio de sciencaj artikoloj en Esperanto ĉiuspecajn revuojn, periodaĵojn kaj kolektivajn verkojn kun sciencaj artikoloj en Esperanto serĉas: Edward Wojtakowski, P. O. Kesto 312, PL 50-950 WROCLAW 2, Pollando.



SOMERA ESPERANTO-TENDARO EN LANĈOV

La tendaro okazos en tri etapoj:

I etapo — 1—14. VII (por junuloj);

II etapo 15—28. VII;

III etapo 29. VII—11. VIII.

Estos kvin gradoj: A — komencantoj, B — progresintoj, C — konversacio, D — estontaj instruantoj, E — tradukantoj.

La tendaranoj loĝos duope en tendoj aŭ kvarope en kabanetoj.

Tendarkotizo: 700 kronoj.

Limtempo: 15a de majo.

La tendaro estas en ĉarma romantika regiono. Instruado — ĉiutage de la 8a ĝis la 12a horo. Posttagmeze: banado, ŝportado, ekskursoj, vesperaj tendarfajroj, kantado ktp.

Pliajn detalojn petu de: Esperanto-klubo, ĈS 674 01 Třebíč, Ĉeĥoslovakio.

TRA LA GAZETARO

En j. „Balkansko Zname“ — u. Gabrovo (20. VI): informo de I. Ĥristov pri distrikta E-konferenco.

En la monata revuo „Bjuletin de NK za evropejska sigurnost i sâtrudniĉestvo“ (junio): eldiro de Nikola Aleksiev, prezidanto de MEM, dum kunsido de la Nacia Komitato por Eŭropa Sekureco kaj Kunlaboro.

En j. „Ŝumenska Zarja“ (8. VII): informo de Cv. Todorov pri la preparlaboroj por la nova lernoĵaro de E-o.

En la sama ĵurnalo (9. XI): informo pri esperantista solenaĵo en Ŝumen omaĝe al la Oktobra Socialisma Revolucio.

En la sama ĵurnalo (14. XII): informo de Rangel Gonev pri solena celebros de la 15-jariĝo de uzina E-societo „Progreso“ en Ŝumen.

En j. „Avtostroitel“ — Aŭtomobilaj Uzinoj „Madara“, u. Ŝumen (19. VII): biografia skizo de Cv. Todorov pri Petro Nenov, prezidanto de la Uzina E-societo „Progreso“.

En la sama ĵurnalo (31. VII): informo pri sukcese finiĝintaj E-kursoj en Aŭtomobilaj Uzinoj „Madara“.

En la sama ĵurnalo (8. IX): du priesperantaj informoj en rubriko „El la vivo de la uzina E-societo“.

En j. „Borba“ — u. Veliko Târnovo (25. VII): artikolo pri la heroo-esperantisto Vârban Genĉev de Vanja Grigorova, kunlaborantino de la Historia Muzeo en la urbo.

En j. „Zagorsko Zname“ — Nova Zagora (3. VIII): artikolo „Esperanto kaj la proleta internaciismo“ de Genĉo Dimitrov.

(Sekvas sur p. IV)

Nia „rosmaro“ Kiril Kalĉev el u. Loveĉ




FORPASIS LA E-VETERANO BOJĈO DAMJANOV

Por ĉiam ĉesis bati la koro de nia E-veterano Bojĉo Damjanov el v. Dâlboki, distrikto Stara Zagora. Li forpasis 84-jara.

Frue Bojĉo eniris la vicojn de la revolucia movado en nia lando. En 1923 li partoprenis en la glora Septembra Ribelo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo. En 1925—1927 pro revolucia agado la faŝistoj ĵetis lin en malliberejon. Tie la sciama junulo entuziasme ellernis E-on. Reveninte vilaĝen li iniciatis viglan E-agadon: malfermis kursojn, komencis vastan internacian korespondadon. Sed post kelka tempo la faŝistoj malpermesis la kurson.

Persekutata de la reakcia potenco, ekde oktobro 1934 Bojĉo Damjanov ekvivis eksterleĝe, ĉiam batalante por la venko de siaj noblaj socialismaj ideoj. Kaptita en 1941 j. li denove estis ĵetita en malliberejon.

Post la venko de la socialisma revolucio (9. IX. 1944) Damjanov estis vickolonelo kaj politika komandanto de divizio, gvida partia funkciulo kaj longe direktoro de uzino „Nedelĉo Nikolov“. Pro sia divers-



flanka popolutila agado li estis honorita per multaj altaj ordenoj kaj medaloj.

Modesta homo, arda adepto de la bulgara-soveta amikeco kaj lapaco inter la popoloj, Bojĉo Damjanov kiel membro kaj multjara ŝatata prezidanto de E-societo „Marko Ivanov“ en v. Dâlboki lasis neforgeseblan ekzemplon. Lian entombigon ĉeestis centoj da homoj.

deziras korespondi

Bulgario

Binka Ŝiŝkova — str. Pliska, bloko „Ĉerven“, vĥod A, pk. 19, 7004 Ruse (24-jara fraŭlino — pri medicino, muziko, fotografio, kino, kolektas insignojn).

Galja Petrova Miteva — str. Ĥristo Botev 12-A, ap. 2, 5300 Gabrovo (16-jara — kun ĈSR, PL, H, I, GDR, F, Afriko, Ameriko).

Valentina Iv. Koleva — str. Bâlgarsko Opâlĉenie 60/B, ap. 12, 6000 Stara Zagora (14-jara — bk, pm, fotoj)

Marija Dim. Dineva — str. Rodopi 42, 6000 Stara Zagora (14-jara — bk, pm, fotoj)

Irina Iv. Georgieva — str. Prof. Beljaev 36, 6000 Stara Zagora (14-jara — bk, pm, fotoj)

Ivanka Borisova — kv. Goznica, ul. Ivan Vazov 25, Loveĉ, (20-jara, fleĝistino)

Todorka D. Genova — ul. Ivan Fotev 11, Loveĉ

PENSOJ DE EMINENTAJ BULGAROJ, NASKITAJ EN FEBRUARO Prof. Asen Zlatarov (14. II. 1885 — 22. XII. 1936)

La persona moralo destinas la socian moralon.

La plej bela floro de la homa animo estas la ideo pri justeco. (El «Moralo kaj justico»)

La amo donas sencon kaj al nia soifo al vero, kaj al nia agado por justeco: sen ĝi ili perdas sian plej karan valoron.

Nenio estas donata al la homo donace: eĉ sian ĝojon li devas pagi per ofero: (El «Kanto pri ŝi»)

La rido estas oksigeno por la vivo. (El «La problemo pri feliĉo»)

Elektis kaj tradukis: Stojan Kostadinov

INTERNACIAJ KURSOJ POR INSTRUISTOJ DE ESPERANTO

6—25^a de aŭgusto 1979, Burgas, ĉe Nigra Maro

La kursoj, ĝuantaj altan renomon, okazis jam dekfoje. Ĉiujare ilin partoprenas ĉ. 200 personoj el deko da landoj.

Eksterlandanoj estas akceptataj **nur**:

- a) en II kaj III gradoj — por lernado de la lingvo — kaj
- b) en la speciala metodika grupo — por diplomiĝi kiel E-instruistoj.

En la kursoj estas akceptataj prefere **instruistoj, kursgvidantoj kaj organizaj aktivuloj** de la E-movado. La akcepto estas farata surbaze de **dokumento pri ekzameno por la antaŭa grado**.

Ĉiutage estas 4 devigaj lernohoroj. La ceteran tempon oni uzas laŭplaĉe (sur plaĝo, en promenadoj, ekskursoj ktp).

LIMTEMPO DE ALIĜO: la 30^a de majo 1979.

KOTIZO: 120 bulgaraj levoj aŭ egalvaloro (inkluzivas nutrado, loĝadon, instruadon, administrajn elspezojn). Sumojn oni sendu al adreso: Bulgario, Sofio, ĉez Vânsnotârgovska Banka do DS Kasa Blagoevski rajon, smetka 185/2553 na Sofijsko Okrâjno Esperantsko Râkovodstvo.

Ĉe neebbla transpago kotizoj estos akceptataj ĉe alveno en Burgas, sed kun **anticipe averta pere de aliĝilo**.

En la komuna loĝejo oni ne rajtas havi kun si infanojn aŭ nekursanojn.

Detalaj informoj estas riceveblaj de: Okrâjno Esperantsko Râkovodstvo, bulv. Ĥristo Botev 97, 1303 Sofio, Bulgario (tel. 31-61-80).

Venu perfektigi kiel esperantisto kaj E-instruisto en agrabla internacia E-medio! Venu ĝui la varman bulgaran sunon kaj la ĉarmon de la Nigra Maro!

(El paĝo 16)

En ĵ. „**Ĝernomorski Front**“ — Burgas (15. VIII): informo pri prelego de doc. G. Dimov el Varno, okazinta en la E-klubejo.

En ĵ. „**Osâm**“ — u. Letnica (8. IX): intervjuo kun la japana e-isto J. Sato, partopreninto en la 34-a TEJO-Kongreso en Veliko Târnovo.

En la sama ĵurnalo (11. XI): impresoj pri la 3-a konferenco de la e-istoj en GDR de Coço Kolarov.

En ĵ. „**Narodno Delo**“ — u. Varna (28. IX): informo pri la renkontiĝo de lokaj e-istoj kun Asen Grigorov, konata E-poeto, kaj Violin Oljanov, redaktoro de revuo „Paco“.

En ĵ. „**Oteĉestven Zov**“ — u. Vraca (3. X): artikolo de Bojĉo Mladenov lige kun la 10-a jariĝo de la lerneja E-societo „Verda Raketo“ en Vraca.

En ĵ. „**Septemvri**“ — u. Bjala (20. X): artikolo „La feliĉa sepdekjarulo“ de la verkisto Dimitro Dobrev pri la konata e-isto Simeon Baltaĝiev el u. Bjala.

En la sama ĵurnalo (10. XII): artikolo „Lingvo de la paco kaj amikeco“ de Simeon Baltaĝiev.

En ĵ. „**Zarja na Komunizma**“ — u. Lovĉ (2. XI): informo pri prelego pri Islando de Radoslav Triĉkov el u. Vraca.

En la sama ĵurnalo (28. XI): granda raporto de la ĵurnalisto Coço Kolarov sub titolo „La amikeco naskas ... amikecon“ (pri

liaj konatiĝoj enkadre de la 3a Konferenco de la e-istoj de GDR).

En la sama ĵurnalo (9. XII): informo de Ilija Ivanov pri fondiĝo de E-klubo ĉe la Sindikata Domo de la Kulturo.

En ĵ. „**Naroden Drugar**“ — u. Jambol (n-roj 107 kaj 108) — granda raporto de la sovetaj verkistino Nadia Andrianova „Ses semajnojn inter amikoj kaj fratoj.“

En la sama ĵurnalo (16. XII): ĉu informoj — pri plenkunsido de la Distrikta Estraro de BEA kaj pri gastado de polaj e-istinoj.

En la sama ĵurnalo (19. XII): informo pri Zamenhof-celebro.

En ĵ. „**Ĥaskovska Tribuna**“ — u. Ĥaskovo (16. XII): artikolo „75 jarojn E-societo en Ĥaskovo“ de L. Vâlĉanov.

En revuo „**Zaŝtita na Mira**“ (Defendo de la Paco) — eldono de la nacia Pacdefenda Komitato, n-ro 5/1978, aperis granda kaj riĉenhava artikolo de doc. S. Podkaminer, membro de la Pacdefenda Komitato en Leningrad, sub titolo „La socialismo kaj la Internacia Lingvo“, tradukita de D. Ĥaĝiev. Enkonduke al la artikolo la tradukinto koncize prezentas la estontajn E-forumojn en nia lando: la 63an UK en Varno, la 34an IJK de TEJO en Veliko Târnovo kaj la VIII ĝeneralan konferencon de MEM en Varno.

Laŭ sia tre riĉa kaj valora enhavo la artikolo de S. Podkaminer estas nepre uzenda en nia E-laboro.

